

# PENSEO

*N-ro 355*

*maj. / 2021*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Hans-Georg Kaiser (Germanio)



### *Konscia komencanta*

Ŝli estas ignoranto,  
jen ŝlia glorokanto.  
Ŝlin pelas nur la vanto  
plu esti komencanto.

Ne estas ŝli suspekta  
pri emo intelekta  
aŭ ĉiam nur korekta  
aŭ eble eĉ perfekta!

Ne trotas ŝli sur vojo,  
kaj eble eĉ kun ĝojo  
por marŝi apud rojo  
kun glormuzikhobojo.

Ŝli ĉion nur komencas,  
ellern' por ŝli sensencas.  
Ŝli sen paŝado pensas,  
pri tio konsekvenças.

Verkante ŝli simplegas,  
ĉar ŝlin la verk' ne regas.  
Ŝli eĉ ne ion legas,  
ĉar ŝli aliajn negas.

La simpla rim' sufiĉas,  
ĉar ŝli ne superstiĉas.  
Artaĵ' por ŝli tro kiĉas,  
ŝli tian ne pastiĉas.

*\* Ŝli estas neologismo: ŝi + li estas ŝli, do ŝi kaj li aŭ ulino kaj viro.*

## Ŭali du Temple (Kanado)



### *La kvar Sferoj*

'Biosfero' — sumo de ĉiuj vivebligantoj  
Suno, grundo, akvo, ĉeloj, plantoj, kaj vivuloj  
Vivaj endoj de la krepusko de vivo ara  
'Biosfero' — heredaĵo de planedo rara.  
'Biosfero' — la fundamento por tera vivo

'Etnosfero' — la sumo de ĉiuj ideoj  
Imagoj, intuicioj, mitoj kaj memoroj,  
Homa sperto ekde la krepusko de konscio.  
'Etnosfero' — heredaĵo de homarascio,  
'Etnosfero' ne eblas sen globa Biosfero

'Egoosfero' — sum' de ĉiuj malvirtoj homaj  
Akaparo, milito, kaj detruoj mediaj  
Homa eco ekde la krepusko de konscio  
'Egoosfero' — venen' por viva biosfero  
'Egoosfero' por la viv' estas detruenda.

'Sciosfero' — sumo de ĉiuj la vivsciencoj  
De ĉiuj homoj agantaj por pacaj vivoj  
Plia evoluo en ĝardeno de konscio  
'Sciosfero' povas integri ĉiujn vivulojn  
Arojn, parojn, marojn de nia planedo rara

Kie vivo ekzistas kiel sur ŝelo de persik'!



## Tiberio Madona (Italio)



### KIO ESTAS?

Kio estas Pasko?  
 Kio estas festo?  
 Kio estas vivo?  
 Ovo malplena  
 plenigenda per larmoj.  
 Glaso da aero  
 en kiun plonĝi  
 por iĝi aero.  
 Devojiĝi tra la vojoj  
 de mondo stranga  
 en kiu neniu  
 iam vivis.

*T. M. 4an de Aprilo 2021*

## Mario Luzi

### Tokato

Jen Aprilo, l' enuo  
 de l' ĉieloj akvaj polvaj,  
 de l' mato la senbruo  
 ĉe la fenestro, tuŝo  
 de vento, pika vundo;  
 de la vivo tiu fremda inundo  
 en la spaco de l' pordoj  
 en la riveroj pal-cindraĵ  
 en via paŝ' eĥata de la volboj.

Tradukita de **Tiberio Madonna**



### La Naturo

Alportinte branĉojn  
 Jen, la du birdoj alvenas,  
 Marŝas kune kun fiero  
 La neston fari komencis ...  
 Ili sidas sur arbo por trovi

La lokon por konstruado  
 de l' neston por nova loĝado.  
 Por ke la birdetoj kresku  
 La neston sub balkonon ili metis.  
 Eĉ du semajnoj ne pasis,  
 Jen, la kvar ovetoj aperis,  
 La ĉielo kaj la suno ridis.  
 Baldaŭ la birdetoj alvenos;  
 Al nova mondo printempa,  
 Tamen la Homo ĉagrenas,  
 Nek ĝuas, nek ridas... Trista!

*06/04/2021*

## Anna Vart (Francio)



### Pro granda mensogo!

Fumas... kaj la ĉielo rigardas triste,  
 Ne volas atesti la homan doloron,  
 Ne povas akcepti la bestan krimon,  
 Ĉar oni lin malpermesis vivi pace...  
 Oni deziras preni sian patrolandon,  
 Kontraŭ mensogo, fari la komercon,  
 Sciu! neniu kapablu frapi la dorson,  
 Devigi al sia popolo la kapitulacadon!  
 Bruligu ili la flagon de granda Honto!  
 Por krei la novan, fortegan Patrolandon!  
 Unuiĝu ĉiuj kun tutmonda armenaro  
 Kaj ili sin plifortigu por feliĉa estonto.  
 Promesas! revenigi la Teron Sanktan,  
 Kun katedraloj kaptintaj ĉe malamiko,  
 Denove reveni kaj retrovi la fortojn,  
 Por rekonstrui, reskrbi la novan paĝon.

*05/04/2021*

## Zara Sarkissianne (Francio)


## Iskouhi Avetiĝian (Francio)



### Nostalgio pri la feliĉa temp'

Kiam denove la tempo nigras ĉirkaŭ mi,  
 La infaneco! vi revenas por min retrovi,  
 Kiel miraĝo vi aperas! kara patrolando,  
 Mi volus vin forte preni por interkizado.  
 Kiel filmo longas. Rigardu! bildoj montras,

Mian urbon ŝatatan kun respublika placo,  
Kiel junaj soldatoj, la pioniroj fiere pasas,  
Inter ili mi vidas min, ridetas kun silento.  
La tempo pasis... plu ĝi ne revenus al mi!  
Mi suferas pro la nostalgio al feliĉa tempo  
Rememoroj karaj! vi gravuritas en mi,  
Foliumas pasintecon, lasinte ĝin en  
album-foto...



17/04/2021

## Sirik Slagmu(Francio)



# Ŝakludo!

En la kastelo vivas la Reĝo kaj la soldatoj lin  
protektas,  
Tutan honoron Reĝino gajnas! meme, ŝi ne  
estas viro!  
Apud la Reĝo kaj la Reĝino ilin la Fantezistoj  
mistifikas,  
Sentime atakinte diagonale, sur ilia propra  
kolor' restas,  
Ili respondecas por defendi la superregon de  
citadelo.  
La soldatoj sinmetas antaŭen por preni ĉiujn  
atakojn,  
Krome por povi la militon nuligi, aŭ alveni ĝis  
landlimo,  
Ili eĉ povas mortigi la Reĝinon, la Reĝon de  
malamiko  
Kaj savi la citadelon laŭ siaj manieroj, ili saĝe  
batalas  
Eĉ kelkfoje sin ofertas, por ke la Reĝo vivu!  
En kastelo servas ankaŭ la reĝaj kaj la reĝinaj  
kavaliroj,

Dum antikvec' oni konsideris ilin, kiel fortajn  
pakidermojn.  
Saltinte tra la barilojn, nune! sekvas kuraĝaj  
Kavaliroj,  
Kiu moviĝas dekstren kaj maldekstren, kiel  
latina "L",  
Kaj ilia atako ne ĉiam estas tre rapida, sed  
efikas tiel.  
La kastelon protektas ankaŭ du solid'fortikaĵaj  
Turoj,  
Kiu samtempe ne permesas lasi la malamikon  
enen;  
Militante supren-malsupren,  
dekstren-maldekstren,  
Turoj faras efikan rolon por sekurigi la Reĝan  
gloron,  
Kiam malamiko proksimas, atakas kun ĉiuj  
siaj fortoj.  
Tamen la potenco troviĝas en la manoj de  
Reĝino,  
Dank' al sia ruzeco, intelekto kaj granda  
strategio,  
Ŝi ĉien atakas, ruzas, manovras kaj fine  
mortigas  
La Reĝon de malamiko! kaj la partio finas  
venkinte;  
Aŭ povas esti, ke du malamikoj foriras sen  
gajni!



23/04/2021

## Siv Burell (Svedio)



# Resti aŭ foriri?

Sekvi venton  
aŭ resti en la herbejo?  
La herbo estas frotrezista,  
fidinda, sekura.  
Sed la vento kunportas

foran tonon,  
 kiu logas kaj tiras  
 kaj instigas al ekveturo.

## DORMI TRO LONGE

Subite ekvekinte  
 estis je la sepa  
 La buso nun foririnte  
 mi preskaŭ ploris  
 Vekhorloĝo ne sonoris.  
 Akordigi ĝin, eble mi forgesis  
 Per telefono mi konfesis  
 al mia laborej'  
 ke mi tro longe dormis  
 Sed – «aŭtomata» voĉo diris  
 «Ni fermas je la kvara».  
 Ho, kia mirinda konsol'  
 mi dancis kiel trol'  
 Estis je la deknaŭa, ne la sepa  
 estis vespero, ne mateno

Tiel iris, kiam mi dormetis  
 pigran aprilan dimanĉon  
 sed certe havis mi bonŝancon  
 ĝis mateno mi redormetis.

### Jadranka Miric (Serbio)



# Ŝi

Hontema suna penetrado  
 tra amaso da nubaro  
 apenaŭ karesa tuŝado  
 laŭ vizaĝo kaj hararo'.  
 Ŝia korpo svelta  
 vestita en blanka surtuto,  
 en manoj ĉapo pelta,  
 dum staras ŝi ĉe la puto!  
 La rido ŝia  
 estis milda kaj sana,  
 kiel ĉe infano deziranta kukon pana!

Certe multoble radia!  
 Falis la unuaj pluvgutetoj  
 kiel roso sur la ruĝaj lipoj ŝiaj.  
 Ekbrilis ore liporosetoj  
 reflektiĝe je la brunokuloj miaj!  
 Ŝi levis manojn alten  
 ĝoje elstariginte vizaĝon sian  
 al pluvo. Ŝia vizaĝa mien'  
 tute sorĉis la mian!



## Memoroj pri malfeliĉa am'

Dentohava suno  
 Miaj manoj frostiĝis,  
 sen la viaj. Mia puno,  
 La fremdaj manoj nun varmiĝas.  
 Viaj malvarmaj lipoj  
 kiel serena tag'.  
 Koŝava\* razas per siaj cent vipoj.  
 transe de la la glacia lag'.  
 Kaŝita suno malantaŭ nuboj  
 de tempo al tempo aperanta  
 salutas palan Lunon vagantan,  
 dum forte eĥas ventobatoj!  
 Koŝava-forta vento /Serbio  
 Kiam suno elpelas homojn  
 promenadi  
 Naskiĝis nova tag'.  
 Malaperis nubovaganta  
 donacante ŝancon al la suna mag'.  
 Iom post iom varme radianta.  
 Paseroj, jen starantaj  
 sur la nuda betula branĉeto  
 vigle ĥoruse pepantaj.  
 Eĥas ilia kantobrueto!  
 Tra branĉaro nigra kaj nuda  
 brilas la sunradioj radiante  
 al la ŝprucfontan' apuda,  
 kie homoj ĝuas babilante.

## Pli ol memoroj

Dum memoroj naskiĝas  
malrapide ili vekigas.  
La ombroj de pasinteco  
volus min gvidi al juneco!  
Ami kaj malami  
estas la ekzistado ĉi-tera  
sed pardoni estas ĥristane. Leĝera  
kunporto eĉ parteton de suno anstataŭ  
malbeni!  
Dormi kaj forgesi  
samas kiel morti. Ĉu pesi  
kiam eĉ lumeto igas vin  
feliĉa ĝis la vivofin'.



## Vera Butko

Ve, neniam ekvidis ŝi Romon  
Kaj ne estis ŝi en Emiratoj,  
Eble iam ne povos viziti  
Ĉar, kun kiu ŝi lasu la katon?  
Ofte sonĝas ŝi dum mateniĝo  
Urbon belan - Ĉita, ege karan,  
Tien ankaŭ ĝi ne veturos,  
Ĉar, kun kiu ŝi lasu la katon?  
Kiel akra trikilo— doloro  
En la spinon “eksidis” kaj “batas”,  
Sed klinikon ne povas viziti,  
Ĉar, kun kiu ŝi lasu la katon?  
Baldaŭ naŭdekjara ŝi iĝos  
Ĝis la 100 restos forta, bonstata  
La sekreto de viv' longa— simpla  
Ŝi ne povas forlasi la katon!

*(Aŭtoro afable permesis kaj ekĝojis, sciante, ke mi tradukos Esperantlingve)*

Tradukis



**Rita Mkrtĉjan**  
(Armenio)

## Mimoza Ahmeti



LA PATRINO KAJ LA FILOJ

Ĉiam pli rare vin mi vidas, ĉiam mi multe  
Mi miras  
Kiel eliĝis mi el via ventro kaj vi ne estas mia  
filino.  
Ĉar vi malgranda patrino estas, senkulpa  
Kaj estas malfortikaj kaj junaj viaj larmoj.  
Vi maljuniĝinta kaj ploranta kvazaŭ bebon  
Kiam vi devas ĝojiĝi  
Ke la aflikto sekvas vin kvazaŭ talpon  
Ĝuste kiam la libero padon malfermas.  
Sed vi malgranda patrino estas, senkulpa...

Dio mia, kion homo kiel vi volis  
En ĉi tiu hardita mondo...  
Vi, kara, ankoraŭ mensogi ne lernis  
Kaj la manoj viaj kvazaŭ etaj bonbonoj estas,  
La dolĉaj manoj, sukeritaj  
Far viaj larmoj.

Bonvenon patrino!  
Jen la hejmo, la kafotaso kaj mia bonkonduco  
Zorge al vi servita estas,  
La sofistiko, tamen, en modo estas  
Kaj pli multe ol la rozaj pomoj via femuroj pli  
valoras  
Kiujn vi evidentigas kaj ne scias.

Levu la kapon, kial vi ploras?  
Viaj filoj jam kreskitaj estas—  
Defiaj bestioj, ne la danĝero ilin sekvas,  
Vin kompateme, patrino, ili amas,  
Ne vin forgesas,  
Pli bone mortas.

Ankaŭ vi en ties koro fenestron havas,  
Ĝojan, luman kaj esperan ovalon,  
Ĉar la viaj estis naivuloj, kvazaŭ militĉevaloj,

Kun grandaj okuloj nutritaj per akvofontoj.

Vi forte amis ilin, kiel vi scipovis ami,  
Forte malbenis patrino, kiom vi kapablis  
malbeni,  
Per la voĉo via kvazaŭ ĉeno da globuloj sur la  
ŝtono...

Iam...ĉu vi rememoras, patrino!  
Enhejme vi kantis,  
Vi juna, bela estis,  
Nun mi komprenas.  
La Okcidento feliĉa, pro tiu kantospeco,  
mortas,  
Kaj la okulo via sian negacion briletas  
Kaj la vivo, patrino, organika, estis:  
La infanoj ludis,  
La naivuloj kiujn per horizonta deliro, vi  
kreskigis...

Jen kie ili estas, ĉefronte, plene de vivosperto,  
La fiĉo estas ilin mortiginta, sed ne la sangon  
ŝprucinta.  
Estas ja ili virgaj, patrino, do viaj ĉiesuloj,  
Estas ja virgaj,  
Nudaj, senprotektaj, kun ĉio per dentoj akirita.  
Ne mallaŭdu ilin, patrino, ĉar ili kulpas. Ilin  
ne malbenu.  
Ili amis vin, patrino, amis vin. Ilin vi amu.  
(Neniam la gepatro povas akiri la infanan  
amon)

Revenu, konsciiĝu, patrino, ne plu ploru.  
Estas la lastaj viaj jaroj, en ĉi tiu dua infaneco  
La suno povas iom varmigi vin, se vi la  
okulojn sekigas.  
Viŝu la larmojn, dispecigitaj ni estas, patrino,  
Por ke iom ridetu, tio pano por ni ja estu.  
Mia malesperigita infano,  
La plej granda Dia pekaĵo sur la tero.



## Nenio tuteca

Mi apartenas al la nenio tuteca  
Kie kuŝas kaŝita la ebleco.  
Mi donacas al la ebleco la tutan penon  
Kaj blinde kredas, blinde tion.  
Ho, se povus submeti  
Tiom estas la tuto, kaj la eterna  
Mi ne scias ke havus alian avidon.  
Al vi mi apartenas, nenio tuteca  
Kie kuŝas kaŝita la plenumebleco  
Kaj la mirinda nulo de la perfekteco...  
Ho se vi povus ami-  
Estas pli ol la amo.  
Ĉu eblas,  
Eblas...

*Elalbanigis*



**Bardhyl Senimi**  
(Albanio)

## Ej Ĉina Antikva Poezio

**Qin Guan (1049-1100)**

—laŭ melodio *Aromo en tuta korto*  
Matene nuboj dispeliĝas,  
printempo ŝajne kun bonvolo  
gajigas homojn: post la pluvo  
serenas la veter' je homa bonhumoro.  
Ekstere de la dom' de temp' al tempo  
alŝvebas flora bonodoro.  
Hirundoj buŝe tenas falpetalon,  
flirtante kun petolo.  
En vento ŝajne pro laciga skuo  
faladas ulmaj guŝoj laŭ memvolo.  
En kort' svingiĝas jen pendolo  
ekstere de la muro la ŝvelinta akvo  
jam lekas la pontopavimon kun ĝojfelo.  
La ruĝa pord' kontrastas forte  
kun plorsalikoj ja en verdkoloro.  
Aŭdiĝas la muzikaj notoj

de plektrado sur liuto en ĉi-horo.

Diboĉi, amindumi tiam  
 ja faris min plezura.  
 Ŝi sidis en kaleŝ' kun ruĝa baldakeno  
 kaj perl-kurten' lazura,  
 mi rajdis sur ĉevalo kun ĉizita selo  
 kaj bridrimen' jadŝnura.  
 Ha, kia scen' parada!  
 Sed nun malriĉo senmezura  
 senigas min je vindrinkado.  
 Mi vere pentas pri pasint' bedaŭra,  
 tempdaŭro de dek jaroj pasis songe.  
 Longlonge mi sur balustrad' la tura  
 apogas min kaj fiksrigardas.  
 Sunlumo tra maldensa nub' nebula  
 radias pale, sentas mi solecon,  
 jen forlasita en vent' susura.



## He Zhu (1052-1125)

### —laŭ melodio *Paŝo sur herbo*

Salikoj jen borderas la sinuan lagon,  
 ambirdoj naĝas estuare de river'.  
 la densaj lemnoj baras jen la vojon  
 al lotuskolektantaj la boatoj pro iel'.  
 Neniuj papilioj aŭ abeloj venas  
 por bonodor' sendita de ventpel'.  
 Kiam petaloj ruĝaj tute falas,  
 lotus' nur havas koron de sufer'.

La subiranta suno brilas super fluso,  
 flosantaj nuboj verŝas pluvon delikatan.  
 Lotuso plendas nur al mi poeto:  
 en tiu jaro ŝi ja havis emon ŝatan  
 ne fari vet-paradon en printempo,  
 kaj poste la aŭtuna vent' turmentas  
 ŝin kaj ŝi per ekzisto nur silentas.

### —laŭ melodio *Verdjada taso*

Ŝi neniam paŝas sur la vojon  
 apud lago.  
 Mi okule sekvas ŝian polvon  
 de forvago.  
 Kiu kun ŝi vivos belajn jarojn  
 en imago?  
 En ŝlosita kort' kun ruĝa pordo  
 jen sen ago,  
 aŭ sur arkoponto aŭ en florigardeno  
 jam en svago?  
 Bone scias nur printemp' pri ŝia  
 paŝotrako.

Ĉe krepusko super herboj nuboj  
 flugas lante.  
 Ŝi elverŝas koron per versaro brila  
 elegante.  
 Da ĉagrenoj havas ŝi en koro  
 kiomkvante?  
 Jen simile al herbaĉoj sur la grundo  
 lagorande,  
 al eventaj salikflokaj super la urbo  
 dancflirtante  
 kaj al la pluvo, kiu falas ja senĉese  
 kaj konstante.

### —laŭ melodio *Preludo al la kanto de ses regnoj*

Bravulo juna amikiĝis  
 kun kuraĝuloj el kvin urboj,  
 kun sama celo, sama volo  
 kaj sama sindonemo al la fratoj.  
 Dum babilad' promesis ili,  
 ke ili ĝuu vivon, morton kune,  
 kaj formu bandon jen regeblan de neniuj,  
 ekskursu kune per rapidĉevaloj,  
 galopu tra la orienta metropolo.  
 Orgie ili drinkis en drinkejoj  
 ja kiel la vorema balenego.  
 Kun falko kaj ĉashundo  
 kurĉasis ili per pafark' kaj sagoj  
 leporojn en kamparo.  
 Ho, kiel ĝoja entrepreno!

Sed ĉio pasis kiel bela sonĝo.  
 Forlasis ili la ĉefurbon kaj disiris  
 al sia propra oficoposteno,  
 ĝuante nur la brilan lunon,  
 ve, kiel lemnoj sur la akvo.  
 Pro multokupiteco en oficaferoj,  
 ekdronis ili en oficaĵaj dokumentoj,  
 kaj alkroĉiĝis al vulgaraĵaj bagateloj.  
 Ili ne havis ŝancon gajni  
 meritojn en batalo kontraŭ l' malamiko.  
 Tamburoj sonis kaj milito ekis.  
 La hunoj jen invadis la landlimon.  
 Jam maljuniĝis ili kaj ne povis  
 batali ĉe l' landlimo de la regno,  
 malgraŭ la spad' krianta por mortigi.  
 Kun spleno ili supreniris la altaĵon  
 rigardi la sovaĝanserojn flugi  
 reire al la landinterno, en ĉagreno.



—laŭ *melodio Perdrika Ĉielo*

Kiam mi revenas al la urbo Suzhou  
 jam okazis granda la vari'.  
 La edzin' neniel povas plu  
 ja reveni kune kun mi.  
 Post prujno-severo eĉ platano  
 duone mortas jen en agoni';  
 nun sen kunul' perdita ajkso\* sola  
 flugas kun trist-kri'.

Rosoj sur la stepo  
 vaporigis jen rapide.  
 La malnova dom' kaj nova tombo  
 sidas sopireme vidalvide.  
 Mi aŭskultas al pluvfalo  
 jen kuŝante en la lit' rigide.  
 Ĉu ŝi povus sub lamplumo  
 fliki por mi apudside?

\*ajkso: *ambirdo, Aix galericulata*  
*elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

### Chile-kanto\* (420 - 589)

La stepo Chile dissterniĝas,  
 kaj tie la Yin-monto restas.  
 La blua ĉielo volbiĝas,  
 kovrante ĉion, kio estas.

La firmament' sublimas,  
 kaj la paŝteĵ' senlimas.  
 Kiam sin movas blovoj,  
 videblas ŝafoj, bovoj.

\*Chile, *nomo de antikva etno en Ĉinio.*

### Huang Tingjian (1045 - 1105)

## Bubalpaŝtanta knabo

Trans la vojeto interkampa sonas lia fluto,  
 kaj la vilaĝon li nun preterrajdas sur bubalo.  
 Kiom da homoj el ĉefurbo, ruzaj kaj avidaj  
 je fam' kaj mono, ne egalas al li en realo!

### Wang Anshi (1021 - 1086)

## Umeffloroj

Umeoj kelkaj kreskas ĉe-angule,  
 spite al frosto, solaj en florado.  
 La floroj ja ne estas neĝ' nature,  
 ĉar la aromo alŝvebas senspure.

### Anonimulo (202 a.k. - 220 p.k.)

## Je la Ĉielo!

Je la Ĉielo  
 mi ĵuras,  
 ke mi amas kaj vin amos  
 por ĉiam kaj eterne.



Nur se ebeniĝus monto,  
 elsekigus sin rivero;  
 vintre bruus tondro,  
 neĝus en somero;  
 kunfandiĝus  
 la ĉielo kaj la tero;  
 mi forlasus mian amon!

**Qin Guan (1049-1100)**

## Ĝuo de frisko

Sudborde fluas malvarmeto sub salikoj  
 kaj bele ornamita pont' sin lokas.  
 Por ĝui l' friskon mi aliras lambastone  
 kaj tie sur brakseĝo min apogas.  
 Dum supre ekaperas la helbrila luno,  
 surlage en boato oni flutas.  
 Kiam zefiro ĉesis, la lotusaj floroj  
 aromon puran kaj subtilan sputas.

**Liu Ban (1023 - 1089)**

## Sur lageto postpluva

La lageto da pluvakvo glatas kiel brila  
 Spiegulo sur kiu la kaban' inverse staras.  
 De l' salikoj flirtetantaj en printempa vento  
 centmil gutoj sur lotusojn helsonore falas.

**Lu You (1125 - 1210)**

## Umefloroj

En matena vento la umeoj ekdisfloras,  
 kiel neĝamasoj, sur ĉi montoj en la foro.  
 Kiel povus mi fariĝi milmil admirantoj,  
 por ke tiuj ĝuu la belecon de po floro!

*elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**



## Zhuangzi

**ĈAPITRO DUDEK-KVARA**

## Xu Wugui

§24-10

Kiam Konfuceo atingis la regnon Chu, la reĝo de Chu aranĝis bankedon por li. Sun Shu'ao staris flanke tenante la pokalon, dume Shinan Yiliao prenis iom da vino kaj faris oferverŝon, dirante:

“En tia momento la antikvuloj kutime diris ion.”

Konfuceo diris: “Mi aŭdis pri la parolo sen vortoj. Mi neniam antaŭe parolis pri ĝi, sed mi nun profitas de tiu ĉi okazo por klarigi ĝin. Shinan Yiliao iam pacigis la konflikton inter du familioj per globeto-ludado inter siaj fingroj; Sun Shu'ao iam estingis la militon faritan de la regno Chu kuŝante kaj ventumante al si en ripozo. Kiel do mi volus, ke mi havu bekon longan je tri ĉi-oj kaj ne povu paroli!”

Shinan Yiliao kaj Sun Shu'ao praktikis la Taŭon sen uzo de vortoj; Konfuceo prezentis sian argumenton sen uzo de vortoj. Tial, kiam la virto estas entenata en tio, kion la Taŭo entenas, kaj la parolo haltas ĉe tio, kion la homa inteligenteco ne povas kompreni, ni atingis la perfektecon. Kiel tion, kion la Taŭo entenas, la virto de la homo ne povas tute kovri, tiel tion, kion la inteligenteco ne konas, la paroloj de la homo ne povas esprimi. La difinado de objektoj fare de la konfuceanoj kaj la moistoj kondukas nur al konfuzo.

Tial la maro ne rifuzas la riverojn, kiuj fluas orienten en ĝin, kaj tiel ĝi faras sian plejgrandecon. La menso de la saĝulo ampleksas la ĉielon kaj la teron kaj donas siajn favorojn al la tuta mondo, sed la popolo ne scias, kiu li estas. Rezulte de tio, li ne tenas oficon dum la vivo, nek ricevas postmortan titolon post la morto. Li ne akumulas riĉecon, nek starigas sian famon. Li povas esti nomata granda homo.

Kiel hundo ne estas konsiderata kiel bona nur pro

sia bojemo, tiel homo ne estas konsiderata kiel saĝa nur pro siaj bonaj paroloj, por ne paroli pri granda homo! Ne sufiĉas al la homo nur la strebado por fariĝi granda, kaj ankoraŭ malpli por fariĝi virta.

Nenio estas pli granda ol la ĉielo kaj la tero; kaj la ĉielo kaj la tero estas perfekte grandaj nur tial, ke ili ne strebas al grandeco. Tiu, kiu komprenas la grandecon en tiu ĉi senco, ĉasas nenion, perdas nenion kaj rezignas nenion dum sia vivo. Li neniel estas influata de la eksteraj estaĵoj. Li retrovas en si la denaskan naturon, kiu estas neelĉerpebla. Li imitas la antikvulojn, sekvante la naturan evoluadon de la estaĵoj. Jen la esenco de granda homo.

### §24-11

Nanbo Ziqi havis ok filojn. Li vicigis ilin antaŭ si kaj venigis la fiziognomikiston Jiufang Yin, dirante:

“Bonvole ekzameni fiziognomike miajn knabojn kaj diru al mi, kiu el ili estos la plej feliĉa.”

“Kun estos la plej feliĉa,” Jiufang Yin diris.

Ziqi ĝoje surpriziĝis kaj demandis:

“Kion do vi antaŭdiros pri li?”

“Kun dividos la manĝojn kun la reganto de la regno ĝis la fino de siaj tagoj,” respondis Jiufang Yin.

Ziqi ekploris kaj demandis:

“Kial mia filo devos alveni al tia mizera sorto?”

“Tiu, kiu dividas la manĝojn kun la reganto de regno, alportas profitojn al sia parencaro, por ne paroli pri la gepatroj!” diris Jiufang Yin. “Kaj tamen vi ekploras ĉe la aŭdo de tio, kvazaŭ vi timus kaj volus rifuzi la feliĉon. La filo estos feliĉa, kial do lia patro ne estos tia?”

“Kiel do vi, sinjoro, estas certa pri tio ĉi?” diris Ziqi. “Ĉu Kun vere estos tiel feliĉa? Li manĝos viandon kaj trinkos vinon, sed ĉu vi scias, de kie ili venos? Mi neniam paŝtis ŝafojn, sed ŝafido naskiĝis en la sudokcidenta angulo de mia domo; mi neniam ĉasis, sed koturno elkoviĝis en la sudorienta angulo de mia domo. Tio ja estas stranga, ĉu ne? Kiam mi kaj mia filo vagados, ni vagados en la ĉielo kaj sur la tero. Ni trovos niajn plezurojn en la ĉielo kaj trovos nian nutraĵon sur la tero. Ni ne akiras al ni meritojn; ni ne komplotos, nek intrigos; ni faros nenion strangan. Ni sekvos la naturan evoluon de la estaĵoj; ni neniam ĝenos la eksterajn estaĵojn. Sed vi parolas al mi pri tiu ĉi vulgara

‘rekompenco’! Kutime aŭguroj antaŭiras strangajn okazaĵojn. Nun danĝero minacas okazi. Ĉar mi kaj mia filo faris nenion malbonan, la danĝero devos esti okazigita de la ĉielo. Jen kial mi ploras.”

Post nelonge Kun estis sendita al la regno de Yan. Banditoj kaptis lin sur la vojo. Pensante, ke estos pli facile vendi lin kiel sklavon sen liaj piedoj, ol vendi lin en lia sendifekta stato, ili forhakis al li la piedojn kaj vendis lin en la regnon Qi. Li hazarde fariĝis la pordogardisto por la grandsinjoro Qu kaj sekve povis manĝi viandon dum la tuta vivo.

### §24-12

Ye Que renkontiĝis kun Xu You kaj demandis tiun: “Kien vi iras?”


“Mi fuĝis de la reĝo Yao,” respondis Xu You.

“Kial do?” demandis Nie Que.

“La reĝo Yao nepre volas praktiki la humanecon. Mi timas, ke li fariĝos mokataĵo de la mondo. La homoj en la estontaj epokoj apenaŭ eviteble sin manĝos reciproke.

“Estas ne malfacile kolekti la popolon ĉirkaŭ vi. Montru amon al ili, kaj ili intimiĝos kun vi; profitigu ilin, kaj ili venos al vi; laŭdu ilin, kaj ili laboros diligente; trudu al ili tion, kion ili abomenas, kaj ili forlasos vin. La amo kaj la profitigo venas el la humaneco kaj la justeco. Estas malmultaj, kiuj forrifuzas la humanecon kaj la justecon, dum multaj estas tiuj, kiuj ricevas profiton el ili.

“La agoj humanaj kaj justaj ĝenerale ne radikas en la sincereco kaj povas fariĝi iloj en la manoj de bestecaj aviduloj. Tial, se iu celas profitigi la mondon nur per sia propra decido, lia opinio povas esti tiel supraĵa kiel unu sola ekrigardo. La reĝo Yao sciis nur, ke la indulĝo estas utilaj al la mondo, sed ne sciis, ke ili estas ankaŭ malutilaj al ĝi. Nur tiuj, kiuj tenas sin for de la indulĝo, povas kompreni tion ĉi.”



### Elĉinigiŝ



**Wang Chongfang**  
(Ĉinio)

# Ĉineske

## Zhuang Qixiong (Ĉinio)



Gratulon al 100a Jubileo de KPC

—laŭ ĉinesko Mantingfang\*

Fajrer' en lag'  
ekbrulis kun  
jarcenta boat-hor'.  
Pioniroj  
strebis por aŭror',  
kaj en longa marŝad'  
rezistis kun sang-dolor'.  
Antaŭen,  
granda afer'  
ĉiam al honor'.

Ador'  
leviĝis;  
Ĉiuj krias  
el fund' de kor':  
Magia ating'—  
ankaŭ trezor'.  
Ĉini' prosperos sur  
silka voj' kun bela flor'.  
Ni serĉu  
veron per vol'  
sub ruĝflaga glor'.

KPC: Komunista Partio en Ĉinio

\*ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 10 kaj 11 versoj de 446, 466, 7444 / 234, 454, 67345 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xa,xa,,xxa / ax,xa,xa,xa,xaa (x=snrima)

## Jadranka Miric (Serbio)

Malvarma printempo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Surprizo!  
Neĝo en April',

vetero ŝanĝiganta..  
Malvarmas neĝokovril'.  
Vintra sonoril'!

Apenaŭ  
aperis suna  
tag'. Kiel agrablas ĉi  
tuŝoj. Poste malpuna  
magio-luna!

Grava tag'  
Morto de patrin'.  
Pasis jarojn. Doloro  
restis. La forta virin'  
estis ŝi. Ĝis fin'!

Vetero  
same malgajas.  
Ja, nia ĉiutagec'.  
Fi pandemio daŭras.  
Tro longe regas.

Venteto  
jen, salutas nin  
pelante nubojn. Revas  
mi pri Arbaro ĉar min  
allogas ĉi pin'

\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

## Zhang Kangkang (1950-)



Sunfloroj

Kiam ni malsupreniris de la monto Tianshan, jam estis vesperkrepusko, sed la sunlumo estis ankoraŭ ardanta kaj brile okulfrapa. De malproksime ni jam rigardis tiun vastan maron da sunfloroj, kiel tumulte flugantaj birdegoj kun orflavaj plumoj ĉe la horizonto.

Nia aŭto alproksimiĝis iom post iom. Ni kaj ekzaltiĝis kaj ekscitiĝis. Tiam ni ekmemoris pri Van Gogh. Amiko petis, ke ni haltu por fari fotojn kun la fono de tiel belaj kaj kolorriĉaj sunfloroj, kaj ke ni pozu

kiel sunfloroj.

Tiumomente la sekreto subite malkaŝiĝis.

La suno subiris okcidenten. La sunradioj restis sur la maldekstra flanko de la ŝoseo la tutan posttagmezon, lasante sufiĉan tempon al tiu vastejo da sunfloroj por ŝanĝi sian direkton. Se la sunfloroj vere havas la karakterizaĵon turni sin al la suno, ili povas praktiki la turniĝon en ĝusta tempo. Tamen tiu vastejo da sunfloroj apatie senmoviĝis, obstine direktis sin orienten kun klinita kapo kaj frontis per sia multetavola verda disko la sunon oblikve pendantan en la okcidento. Ilia pozo, komparante kun tiu en antaŭtagmezo, neniom variis. Ili eĉ ne havis iom da intenco turni sin al la suno. Iliaj dikaj tigoj rekte staris kaj ili rifuzis la kison de la suno per siaj pezaj kapmalantaŭoj.

Kiam vesperkrepusko preme alproksimiĝis, la dorsoj de la orflavaj petaloj estis prilumitaj travideble sub la suno kaj emanis brilon de pura oro. Kvazaŭ sennombraj flavaj flagetoj flirtantaj en la vento, ili prezentis leviĝantan orlumon super la vastejo de la sunfloroj. Ĉu ĝi preferas renkonti la venton ol la sunon?

Aĥ, tiuj ĉi estas la sunfloroj, kiuj frontas la sunon per sia dorso.

Vi povas longe iri tien kaj tien inter tiuj sunfloroj, karesi iliajn silkecajn kaj humidetajn petalojn, skueti iliajn vilajn kaj helverdajn tigojn, suprenrigardi la plenpufajn brunflavajn sem-diskojn sur branĉoj, kaj senĉese iri runde ĉirkaŭ ili. Frotante viajn okulojn, vi fojfoje pririgardas la sunon kaj naskas la dubon: ĉu tiuj sunfloroj, kiujn oni bone konas, aspektas kiel monstra mensogo?

Ĉu ĉiuj sunfloroj tra la mondo entute ne havas la karakterizaĵon sin turni al la suno aŭ tiuj ĉe la piedo de la monto Tianshan subite ŝanĝas sian genetikan genon kaj fariĝas ribelema modelo?

Ĉu eble la sunlumo ne havas sufiĉan lumecon aŭ malfortan altirforton? Sed vi vere ne povas malfermi viajn okulojn kontraŭ la sunlumo.

Ĉu la grundo estas tro sterila, ke ili havas sufiĉan fortan por iom turniĝi? Sed ili ĉiuj kreskas forte kiel arboj.

Eble tiuj maturaj sunflorsemoj tro pezas, t.e. iliaj diskoj aŭ cerboj pleniĝas je tiel multe da umoj, ke ili ne

plu blinde obeas, ĉu? Sed ili ŝajnas ankoraŭ junaj, iliaj petaloj vikle vibras kaj facile ĉirkaŭrigardas kun levita kapo, tute en la maniero de prospero kaj ĝojo. Kiam ili staras kun la dorso al la suno, ili tenas sian kapon orgojle levita, sen iom da flatemo kaj humileco.

Do, ili certe estas speciala specio enkondukita de fremdlando, kaj post nutrado de la neĝakvo de la monto Tianshan fariĝis la alia subspecio disde la sunfloroj. Kiam vi dentfendas pure bongustajn semojn de tiuj sunfloroj, ĉu vi povas fari distingon inter ili?

Pro tio vi eble divenas kaprice, ke la sunfloroj starantaj solaj, kiujn vi vidis antaŭe, tre bezonas fiate sin adapti al la sunlumo por forpeli sian solecon, kaj preni ĝin kiel sian kunulon aŭ kredon. Do, kio pri grupo da sunfloroj? Kiam ili kuniĝas en grupon, ili brave levas sian kapon, manon ĉe mano.

Ili estas kolektivo, kiu ne plu mallevas la kapon. Kiam vi fiksrigardas ilin refoje, vi trovas, ke neniu el tiu vastejo da sunfloroj, eĉ maldika aŭ malalta, ĉe ajna angulo aŭ rando de la vastejo, kaŝeme turnas sian vizaĝon al la sunlumo. Ili ĉiam tenas sin en impona stara pozo ĝis la suno leviĝos denove morgaŭ, aŭ ĝis iliaj vizier-petaloj velkos kaj flirte falos, aŭ ĝis ili estos falĉitaj per serpo.

Finfine, kiam ilia kapo peze falos sur la teron, venos la tagoj de vera maturiĝo de iliaj semoj en la disko.

Tamen vi vole nevole turnas vian dorson al ili kaj denove ekvojaĝas en la vesperkrepuska sunlumo.

Tiu vastejo da sunfloroj, kiuj frontas la sunon per sia dorso, tiamaniere kontraŭlume, lasas siajn rektetarajn kaj malklarajn dorsfigurojn en via fotalbumo.



elĉinigi **Fangfang (Ĉinio)**



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)

